

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

Pensu globe, Agu loka! **Por la Landa kaj Faka Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**EKO 2023 / 40. Julio 10 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: KB. Sume:**

## Speciala Nov-Zelanda eldono

Nov-Zelando konsistas el tri ĉefaj insuloj kun du el ili forte loĝataj. Ĝi situas en la suda Pacifiko, ĉ. du mil kilometrojn for de Aŭstralio. Ĝi havas grandecon similan al Britio aŭ Japanio. Ĝi estas ĉefe montara lando; la plej alta pinto estas Aoraki (Mt. Cook), je alteco de ĉ. 3800 m. La loĝantaro ampleksas nur kvin milionojn. La plej granda urbo estas Aŭklando en la nordo; la ĉefurbo kun la parlamento estas Velingtono (*Wellington*). La plej granda urbo en la suda insulo estas *Christchurch*, kiu suferis du tertremojn.



La lando havas du lingvojn, la anglan kaj la maorian. Ĉiu registara fako devige havas sian nomon ankaŭ en la maoria. Multaj muzeoj, lernejoj, kulturaj centroj kaj aliaj instancoj simile havas.



La lando havas insulan klimaton, do ŝanĝiĝoj de horo al horo estas atendendaj. Sekve, la ĉefaj riskoj en Nov-

Zelando estas ŝtormoj kun inundoj kaj tertremoj.

La lando funkcias per 'verda' energio; plejparte hidro-energio, kun krome iom da geotermala energio. La lando havas sen-nuklean politikon. Karbon ĝi eksportas nur al Azio, apenaŭ plu uzas mem. Post terura incidento, la lando ene de tri semajnoj akceptis leĝon por malpermesi la uzon kaj posedon de militstilaj armiloj.

## Nov-Zelanda Eo-gvidantaro

Jen la nuna estraro de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. [maorie](#) 'e Rōpū o Aotearoa mā te Reo o te Ao'.

- [Bradley McDonald](#): prezidanto;
- Chris Krageloh: vicprezidanto;
- [David Ryan](#): sekretario-kasisto;
- Dave Dewar: asista sekretario;
- [Josuo Marso](#): komitatano;
- Erin McGifford: komitatano;
- Stephen Epstein: komitatano

Vidu ĝian anglalingvan retejon: <https://www.esperanto.org.nz/>

## Maoria-Esperanto-Maoria Vortaro ekzistas!

Brian Fox, Publikigita de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, ISBN 978-0-473-20249-1  
Formato PDF; Novembro 2011.

Disponibla ĉe [www.esperanto.org.nz/](http://www.esperanto.org.nz/); (Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe)

## La Traktato de Waitangi en Esperanto

Tiu traktato estis subskribita en Waitangi je la 6-a de februaro 1840, de maristo Hobson kaj granda kolekto de maoriaj ĉefoj. Waitangi estas en la norda parto de Nov-Zelando. Tial estis elektita la EKO-komuniko 40 ĝuste por festi la Tagon de Waitangi. Ĝis hodiaŭ la 6-a de februaro estas en Nov-Zelando nacia ferio: La Tago de Waitangi. Tiu traktato estis forte favora al la blankulaj envenintoj, sed pli bona ol tiaj traktatoj uzataj en aliaj kolonioj ĝis tiu tempo. Poste, la traktato estis submetita serioza retrakto flanke de la nov-zelanda registaro.

La elekto farita de la tradukista unio NZSTI por festi sian 30-jariĝon estas tradukoj de Te Tiriti o Waitangi / la traktado de Waitangi en tridek lingvoj - ambicia celo.

## La Traduko en Esperanto

'Viktoria, la Reĝino de Anglio, en sia zorgo protekti la ĉefojn kaj subtribojn de Nov-Zelando, kaj en sia deziro konservi por ili ilian kuratorecon kaj iliajn bienojn, kaj daŭrigi la pacon kaj bonstaton, konsideras ke estas juste enoficigi administriston, kiu intertraktos kun la popolo de Nov-Zelando por ke iliaj ĉefoj konsentu pri la establiĝo de la Reĝina Registaro en ĉiuj partoj de tiu ĉi lando kaj la (apudaj) insuloj, kaj ankaŭ ĉar multaj de ŝiaj regatoj jam loĝas en tiu ĉi lando kaj aliaj poste venos. Do la Reĝino deziras establi registaron por tio, ke nenia malbono alvenu al la Maorioj kaj Eŭropanoj, kiuj vivas senleĝe. Do la Reĝino enoficigis min, Vilhelmo Hobson, kapitanon en la Reĝa Mararmeo, kiel Guberniestron en ĉiuj partoj de Nov-Zelando - tiuj kiujn baldaŭ ricevos la Reĝino kaj tiuj ricevotaj poste - kaj prezentas al la ĉefoj de la Konfederacio, la ĉefoj de la subtriboj de Nov-Zelando, kaj la ĉefoj aliaj ĉi tiujn leĝojn sube.

**La Unua:** La ĉefoj de la Konfederacio kaj ĉiuj aliaj ĉefoj, kiuj ne aniĝis al tiu Konfederacio, donas absolute al la Reĝino de Anglio por ĉiam la tutan regadon de ŝiaj teritorioj.

**La Dua:** La Reĝino de Anglio aranĝas kaj konfirmas al la ĉefoj, la subtriboj, kaj la tuta popolo de Nov-Zelando la tutan gamon de iliaj bienoj, vilaĝoj, kaj ĉiuj iliaj trezoroj. Sed aliflanke, la ĉefoj de la Konfederacio kaj ĉiuj ĉefoj permesos al la Reĝino aĉeti bienojn je prezo konsentita de la posedanto kaj la aĉetonto nomita de la Reĝino kiel aĉetagento.

**La Tria:** Do, pro tiu aranĝo konsentita rilate al la Registaro de la Reĝino, la Reĝino de Anglio protektos ĉiujn Maoriojn de Nov-Zelando kaj donos al ili ĉiuj la samajn rajtojn kiel ĉiuj Angloj.

[subskribita] Vilhelmo Hobson, Konsulo kaj General-Leŭtenanto. Do ni, la ĉefoj de la Konfederacio de la subtriboj de Nov-Zelando, kunvenantaj ĉi tie ĉe Waitangi, vidinte la formon de ĉi tiuj vortoj, kiujn ni akceptas, konsentas registri niajn nomojn kaj signojn tiel. Farita ĉe Waitangi je la sesa tago de Februaro en la jaro de Nia Sinjoro 1840. La Ĉefoj de la Konfederacio.

## **Bilda parado pri Nov-Zelando** . Fotoj de SMG:



Aoraki – la plej alta monto



Rokaro apudmara Punakaiki



Abundas fokoj kaj bestoj



Akvofaloj abundas



La plej norda pinto



La riĉa maoria kulturo

### **Liberiĝu de mito pri la maorioj**

Vaste kredate estas, ke maorioj salutas unu la alian per frotado de nazoj. Tute malvera. Kion ili fakte faras estas kuntuŝigi siajn fruntojn. Tio havas la signifon: 'Niaj du mensoj kaj pensoj estas samaj'. Estas nur fiziologia ĝeno, ke la du nazoj elstaras en sia kapablo malhelpi la geston. Provu mem tuŝi fruntojn kaj vi vidos, ke la nazoj obstaklas la provon!

## **Po kare kare ana**

//ankoraŭ finota, mallongigu! RM, ignore tion!

La kanto kun la vortoj. Hayley Westerna

<https://www.youtube.com/watch?v=m8kom5vHFyQ>

Hato Hohepa – Maoriaj knabinoj de Sankta Jozefo

[https://www.youtube.com/watch?v=b\\_-RskBooWA](https://www.youtube.com/watch?v=b_-RskBooWA)

Quin Tiki Maoria Mikso (1968)

<https://www.youtube.com/watch?v=RXLbt2SyIZ0>

Front Row Chorus:

<https://www.youtube.com/watch?v=9rMAi-IUACI>

Damo Kiri Te Kanawa

<https://www.youtube.com/watch?v=Cw2nlpDc6aA>

Mi ploris aŭdinte tiun muzikon – kiun ni regule kantis en la muzika repetuaro dum miaj lernejaj jaroj. Mi memoras la tutmondan sukceson de la damo diskoniganta la maorian kulturon tra la mondo.

## Haka - maoria defia danco

Maoriaj triboj ofte batalis – sed malofte rezultis gravaj vundoj. La ekiro de batalo estas la minaca danco 'Haka', kies celo estas jam timigi la alian partion (psikologia militado ekde la jaro 1100!). Nuntempe la feroce kaj tre sukcesa nov-zelanda rugbea teamo utiligas la dancon 'haka' komence de ĉiu . Kutime, pluraj el la rugbeaj ludantoj efektive havas maorian originon. Jen kelkaj ligoj al la uzo de 'Haka' en la nuna mondo:



Haka trans la tasmana maro – en Sidneo.

<https://www.youtube.com/watch?v=Rf6m8U51HYU>

Haka trans la alia oceano – en Vankuvero

<https://www.youtube.com/watch?v=vnvI6V-TtLs>

Haka maltrans oceanoj, en Nov-Zelando por timigi la vizitantan rugbean teamon el Irlando.

<https://www.youtube.com/watch?v=TI93YHILSgk> (nur la komenco)

Haka en funebra ceremonio. Dancas policisto kaj militisto.

<https://www.youtube.com/watch?v=UXdcgKjgNHs>

Haka en geedziĝo – ekploras la baldaŭa edzino.

[https://www.youtube.com/watch?v=oBfQ1uf\\_Ukw](https://www.youtube.com/watch?v=oBfQ1uf_Ukw)

===== 1040 vortoj =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.: La kolekto de EKO:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 30.).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniām-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto. // Irene kaj GK ene. Julio 6 ED jul 7. Refoje al RM julio 9